


SUBTRANCIA STELO



Bulteno de la Federacio "LANGUEDOC-ROUSSILLON"

Jarabono: 30 F

La Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon

456-28 P Montpellier - N° 123 -4a kvaronjaro 1992

Bonnan Jarono al Eŭropo kaj al VI 1993 KALENDARO

JANUARO

D	L	M	M	J	V	S
3	4	5	6	7	8	9
10	11	12	13	14	15	16
17	18	19	20	21	22	23
24	25	26	27	28	29	30
31						



JULIO

D	L	M	M	J	V	S
4	5	6	7	8	9	10
11	12	13	14	15	16	17
18	19	20	21	22	23	24
25	26	27	28	29	30	31

UNIVERSALA KONGRESO en VALENCIA
Antaŭkongreso en Barcelono

FEBRUARO

D	L	M	M	J	V	S
7	8	9	10	11	12	13
14	15	16	17	18	19	20
21	22	23	24	25	26	27
28						

Kunlabore kun "E°-Jeunes"
E°-France: Budo F43, Halo 5a

AUGUSTO

D	L	M	M	J	V	S
1	2	3	4	5	6	7
8	9	10	11	12	13	14
15	16	17	18	19	20	21
22	23	24	25	26	27	28
29	30	31				

TEJO-kongreso en Vrac (Bulgario) 7-14
SAT-kongreso en Kazanlak " " 14-21
Staĝo/ferisemajno en Habère-Poche
21.28 (Alpoj)

MARTO

D	L	M	M	J	V	S
7	8	9	10	11	12	13
14	15	16	17	18	19	20
21	22	23	24	25	26	27
28	29	30	31			

Staĝo en la Roque d'Anthéron

SEPTEMBRO

D	L	M	M	J	V	S
5	6	7	8	9	10	11
12	13	14	15	16	17	18
19	20	21	22	23	24	25
26	27	28	29	30		

Internacia semajno de Sète (marbordo)

APRILIO

D	L	M	M	J	V	S
4	5	6	7	8	9	10
11	12	13	14	15	16	17
18	19	20	21	22	23	24
25	26	27	28	29	30	



2 Temoj: a) kiel ekstereŭropanoj konsideras EEK b) ĉu E° taŭgas al Eŭropo kaj inverse?

OKTOBRO

D	L	M	M	J	V	S
3	4	5	6	7	8	9
10	11	12	13	14	15	16
17	18	19	20	21	22	23
24	25	26	27	28	29	30
31						

LE RETOUR DE L'ESPÉRANTO
UNE SEULE LANGUE POUR L'EUROPE

Qu'est-ce que l'espéranto ? A l'heure de la recherche scientifique, les pays de cette langue internationale essaient de faire entendre leur voix.

LE DR ZAMENHOFF : UN FABULEUX LINGUISTE

MAJO

D	L	M	M	J	V	S
2	3	4	5	6	7	8
9	10	11	12	13	14	15
16	17	18	19	20	21	22
23	24	25	26	27	28	29
30	31					

NACIA KONGRESO EN PAU 8-11
Federacia kongreso (Limoux)
samdate Provenca Kongreso
Staĝo en Batipaume (Agde)
19.23

NOVEMBRO

D	L	M	M	J	V	S
1	2	3	4	5	6	7
8	9	10	11	12	13	14
15	16	17	18	19	20	21
22	23	24	25	26	27	28
29	30					

JUNIO

D	L	M	M	J	V	S
6	7	8	9	10	11	12
13	14	15	16	17	18	19
20	21	22	23	24	25	26
27	28	29	30			

Kongreso de Fervojistoj en Cervia (Italio)

DECEMBRO

D	L	M	M	J	V	S
5	6	7	8	9	10	11
12	13	14	15	16	17	18
19	20	21	22	23	24	25
26	27	28	29	30	31	

LA NIGRA INSULO

DEJA TRES REPANDU

LA PLEJ BONA ARTIKOLO PRI ESPERANTO EN LA GAZETARO ĈI-JARE EN "LE MEILLEUR" (kompreneble !)

Dernière minute: Pierre Janton, Professeur d'anglais et d'espéranto à l'Université de Clermont-Ferrand, auteur du livre "L'Espéranto" (Puf/Que sais-je? n°1511), donnera deux conférences à Limoux, les 15 et 16 Mai 1993. Un rendez-vous à ne pas manquer!

Lastminute: P-ro Pierre JANTON prelegos en LIMOUX (15 - 16 v)



FEDERACIA KONGRESO

en Limoux (Aude)

la 15an

+ 16an de Majo 1993

Salle Louis Coste



Kontaktadreso:

poŝta: E°-kongreso Office de Tourisme BP5 11303 LIMOUX (Aude)
 telekopia: 61-67-20-25 telefona: 61-60-86-83 aŭ 61-01-01-65
 minitela: 36 14 CHEZ* JORGOS

INVITO al fondo-kunveno de
 (sendependa) E°-federacio de
 MEZNORDAJ PIRENEOJ



INVITO al Sudfrancia
 Junulara E°-renkontiĝo

TEMO por PUBLIKA DEBATO

"Okcitanio, Katalunio,
 Lingvo-regionoj en Eŭropo"

Provizora programo:

Ĵaŭdon la 13an kaj vendredon 14an: E°-ekspozicio por lernejoj

Vendredon, je la 21a h: Prelegdebato pri E°/Iniciado/lingvaj ludoj/muziko por gejunuloj
 sabaton, la 15an: ekde la 8a: akceptado en la kongresejo (taŭga por rulseĝoj)

biciklado al Saint Benoît por reloki E-lingvaj strato-ŝildetojn

je la 9a: Ekzamen-sesio de ILEI (aliĝo nepre antaŭ la la de Marto)

daŭrigo posttagmeze je la 14a horo : ekzamenoj de FEI

je la 15a: E-lingva prelegeto fare de eksterlandano kaj samtempe:

franclingva PUBLIKA DEBATO (temo ĉi-supre)

kunordigita kun Okcitanistoj kaj Katalunistoj

je la 18a: SPEKTAKLETO: skeĉoj, ĥoro

je la 19a: Vespermanĝo (nemultekosta en Mezlernejo)

je 20h30 : SPEKTAKLETO: Ĥoro, skeĉoj...

de la 21a 30 ĝis la 24a: FOLK-BALO kun AIGARELA, Langvedok-Arjeĵa tradicimuzik-grupo, simpatianta
 esperanton kaj bonetose danciga ĉiuagulojn/E-lingva danco-gvidado de Monik'
 (Por dancemaj nekongresanoj: 30F)

de la 25a h. ĝis ekmateno eblos noktumi en nokto-dancejo kun la konataj ROZ-MARIAJ BEBOJ

Alternativ-Rokgrupo el Tolosa/Tuluzo -E°-kantema!!!

dimanĉon, la 16an: je la 9a: Debateto: "Kiel vigligi?" (Jorgos)

je la 9a30: Jarkunvenoj de la E°-federacioj+Sudfrancia junularo+Jefo

Dum la mateno la federacioj kunvenos kun la gejunuloj

je la 12a: region-tipa festmanĝo en "Maison de la Blanquette"

je la 14a: Vizito de la Keloj de "Sieur d'Arques" aŭ pied-migrado

je la 15a: eblos pliaj vizitoj: pentrista muzeo, preĝejoj de mezepoka Limoux

St Benoît, Montbel-lago, Quillan (Zamenhof-strato), varmakva Alet
 Arkeologia Muzeo en Rennes le Château...

Informoj:

La vizito de la keloj estos tutescepte por ni senpaga. Vendo de "Blanquette" kun E°-etikedo
 "Blanquette de Limoux" estas bongusta ŝaumvino, la unua en mondhistorio (6 boteloj=210 f)

Eblas okazigi pliajn aferojn laŭ via propono, eĉ lunde, marde, ktp por vigligi la tieajn kursojn

" vizitoj de la regiono : Ariège, Carcassonne, Toulouse...

Dum la tuta kongreso infanoj estos prizorgataj de patr-in-oj kaj instruemul-in-oj

Kotizoj:

ĝis la 5a de Februaro

ĝis la 5a de Majo

poste

Federacianoj	40 f	50 f	70 f
ne-federacianoj	50 f	60 f	80 f
(13- ĝis 26-jaruloj	30 f	40 f	60 f
(aŭ familiano de plenkotizulo			
infanoj ĝis 13 jaroj	10 f	20 f	40 f
nefrancianoj : senpaga aliĝo			

Aliĝu frue : tiel vi faciligos la organizadon kaj ŝparos monon !

Ne-esperantistoj povas interesiĝi pri granda parto de la programo. Venigu iun!

ALIGON vi trovos sur la lasta paĝo, plenigu kaj resendu

Renvoyez le bulletin d'adhésion de la dernière page.

Le programme peut intéresser des non-esperantistes. Ne venez pas seul-e-s!

SUDFRANCIA STELO

Kiel jam indikite, la nova abontarifo de SFS estas 30F.
 Se vi pagas per poŝtĉekkonto, vidu la pĉk. p. 1.
 Se vi pagas per bankĉeko, sendu ĝin al nia kasistino.
 Se vi apartenas al E^o-grupo, via kasisto/kasistino kolektos la abonojn kaj sendos la tuton kun nomoj, adresoj al nia kasistino.
 Ciukaze ni estus dankemaj enkasigi la abonojn antaŭ la venonta numero.
 Ne atendu la jarfinon aŭ avertleteron por pagi tiun malaltan sumon. Anticipan dankon!
 Le tarif d'abonnement à votre bulletin est maintenant de 30F. Adresse de notre trésorière ci-dessus, n^o de CCP sur la I^o page. Vous pouvez aussi vous adresser au trésorier de votre groupe. Merci de nous faciliter la tâche en réglant avant le prochain numéro.

Trésorière/Kasistino:
 Lucette NÉGRON Tél 67 71 05 79
 40, chemin des Amandiers
 F-34400 LUNEL

Al kiu sin turni por informoj, petoj, ktp: →
 aŭ al la vic-prezidanto Louis Ensueque,
 7, Rue Gustave 34000 Montpellier
 Tel. N^o: 67586418, laborejo 67074262.

Président/Prezidanto: → Secrétaire/Sekretario:
 Jean HÉNIN → Charles GÉRARD-VOÏÇON
 Beauregard-Rte de Montcayroux 4, rue Dr Georges Rives
 F-48500 LA CANOURGUE F-66000 PERPIGNAN
 Tél 6632 86 36 Tél 68 55 51 77

Pri la federacia kongreso, vidu p. 2 pri la staĝo en Agde p. 5
 pri la semajnoj en Habère-Poche aŭ Sète p. 6
 Pri la Nacia kongreso en Pau aŭ la UK de Valencia informas UFE.
 La Federacio restas je via dispono por informoj pri la aranĝoj menciitaj en la bulteno.
 Pri "Sudfrancia Stelo" respondecas J. Hénin.
 Li dankas la kontribuintojn. Ciufoje skribu koncize, en esperanto kaj ANTAU LA LIMDATO !

KOTIZOJ

UFE 4, bis Rue de la Cerisaie 75004 PARIS CCP 855.35 D PARIS

Aktiva membro (kodo FMA): 260FF same por paro: 395 (PKI-PK2) Simpla membro: 150F (FSM)
 Dumviva membro : 5200F (FDM)
 UEA: Membro kun jarlibro: 110F (UMJ) kun jarlibro kaj revuo "E^o": 275F (UMA) Dumviva: 6875 (UDM)
 *** Membro kun la 1a parto de la jarlibro: 45F (UMG)
 Patrono de JEFO (pli ol 30 jaroj): 120F (USZ) - ricevas "Jefo Informas" kaj "Koncize"
 Simpatianto " " 30F (JSP)
 Patrono de TEJO " 330F (PTM) - ricevas "Kontakto" kaj "Tejo Tutmonde"
 JEFO-TEJO: por gejunuloj ĝis 30 jaroj; Jefo estas franca asocio, Tejo estas tutmonda.
 JEFO: aktiva membro (ricevas "Jefo informas" kaj "Koncize") 120F (JSM) studento, senlaborulo,
 militservanto: 75F (JMM)
 TEJO: Membro kun Jarlibro + "Kontakto" + "Tejo-tutmonde" : 105F (MJT)
 " " " " + "Esperanto": 260F (MAT)

SAT - (AMIKARO) -67, Avenue Gambetta 75020 Paris

Sat-Amikaro: kotizo+abono: 160F (ĝis 25j.: 80F)
 Sat: 235F, emeritoj: 180F; samfamilianoj, junuloj, senlaboruloj: 118F
 Sennacieca revuo: 45F "La Migrantoj" (Naturamikoj): 40F

ABONOJ

Peradas por vi UFE	Abonigi geamikojn el landoj ankaŭ eblas pere de UFE.	nepagipovaj
Brita esperantisto (6 numeroj)	120	La Dua Jarcento (Internacia Esperanto-Muzeo Wien) 100
Dia Regno (12 numeroj)	80	La kancerkliniko (5 numeroj) 120
Ekumenismo (4 numeroj)	60	La Ondo (Literatura revuo el Ruslando — 6 numeroj) 60
El Popola Ĉinio (4 numeroj)	150	Lingvaj Problemoj, Lingvo Planado (LPLP — 3 numeroj po 100 p.) 190
Esperanto (por Ne membro-abonantoj de UEA (11 numeroj))	165	Literatura Foiro (6 numeroj) 165
Espéranto-Actualités (en français, pour 5 ans)	180	Literaturaj numeroj de Franca Esperantisto po 3 po 1 70 30
Esperanto-dokumentoj (en angla, aŭ esperanta, aŭ franca)	140	Litova Stelo (6 numeroj) 60
Espero el Koreio (6 numeroj)	50	Monato (12 numeroj) 210
Eventoj (24 numeroj) aerpoŝte	185	aerpoŝte 245
Fonto (Literatura revuo, 12 numeroj)	215	La Jaro (poŝkalendaro de Monato) 30
Franca Esperantisto (por NE aktivaj membroj de UFE) (11 numeroj)	100	aerpoŝte 42
Franca Katolika Espero	170	Norda Prismo (Kultura revuo pri Nordio — 4 numeroj) 75
Heroldo de Esperanto (16 numeroj) aerpoŝte (konsilinde)	40	Rock gazet' Abono por 4 numeroj) 100
Kontakto (por NE TEJO-membroj)	144	Ruslanda Esperantisto (12 numeroj) 45
Kulturaj kajeroj (Grésillon — 4 numeroj)	169	Verda Lupeo/Fenikso (4 numeroj) 70
	70	Vjetnamio (4 numeroj) 75

Juna amiko kreskos en 1993!

Ne plu 24 paĝoj, sed 32!

Legu REVUON "Juna Amiko"!
 Vi tute ne emuos kaj bonege plispektrigos!



juna amiko

Abonu nun:
JAM UNIKA
JUN-AMIKA

Juna amiko
 Abonu nun ĉi-tiun unikajn intracian revuon por lernejoj kaj komencantoj. Rakontoj, enigmoj, ludoj, konkursoj, stecoj, kantoj, fabeloj kaj artikoloj el la tuta mondo. Pli ol 4000 legantoj en 30 landoj. Ideala help-materiale por instruistoj kaj kurs-gvidantoj por aktivaj lernantoj!
 Via peranto: JORGOS - F - 09 120 Sa. Int. - FELIX - de - Rt; Abono por kvar numeroj: 50 FRF - ojn. Rabato por kvantaj mendoj.

HERAULT

Novaĵoj de BEZIERS

Malbona ŝanco:

Fine de novembro la 19an surstrate reirante hejmen post devigo en Béziers, Sinjorino Authier falis teren malbonŝance. Rompiĝis la femurkolo. Urĝe oni veturigis ŝin en klinikon, kie kirurgisto ŝin operaciis. Post kelkaj tagoj ŝi rehejmiĝis, hejme nun ŝi estas reedukata. Ni al ŝi bondeziras rapidan kaj pli bonan sanigon.

Malagrablaĵo.

La decembra kunveno okazis la 5an de decembro. Pro sia grava akcidento prezidantino Sino Authier bedaŭrinde ne partoprenis la kunvenon. Nia sindonema sekretariino, kiel la "Subprefekto ĉe la kampoj" pli ŝatis rukulkanti pro bonfarado favore al iu sinistrita vilaĝo post pluvkatastrofo, nur la kasistino tronis kaj akceptis kompreneble la kotizojn de la malfruantoj. Do fine nur 8 personoj ĉeestis tiun monatan kunvenon, du senkulpiĝis; post kutimaj informoj- (Ĉefe pri malbona novaĵo: Argentiano ne vizitos Béziers, Ĉar ĝis nun ni, laŭdire, akceptis la vizitantojn (tro) ofte, ĉi-foje la organizantoj de tiu rondvojaĝo donis la unuecan rajton al tiuj, kiuj ĝis nun ne kutimis aŭdi ilin, bone!)

Jen feliĉo:

Poste ni zorgis pri la Z-festo, kiu okazos la 12an de decembro, kun grandaj entuziasmoj la gelermantoj de la dua kurso sindoneme akceptis kuiri, baki kaj organizi kvazaŭan spektaklon por inde festi tiun memortagon.

Raporto al la Prezidantino:

La 12an de decembro Prezidantino, hejme, pri ni certe multe pensis! Dume ĉiuj sindoneme organizis tiun Z-tagon. En ĉiuj anguloj de apuda kuirejo kaj de la salono zumadis la gekuiristoj kaj ordigantoj. Tiuj preparis kun aŭ sen olivoleo la salatojn rikoltitajn en bitera ĝardeno, la mimojaj ovoĵoj en vice venis el St Pierre, la kuniklopasteĉo alkuris de Aigues-Vives ruligante antaŭ ĝi la belegajn pomtortojn, nur la "pizze" varmaj estis servitaj de Béziers, la salmoŝaŭmo vogis tra "le Vernazobre kaj Orb" por albordiĝi ĉe "La Maison de la Vie Associative", ah! kara Prezidantino, mi ne parolos pri la trinkaĵoj el ĉiuj sakoj oni elteris iun bongustaĵon, eĉ avena likvoro fluis de St Afrique: Ĉiuj tre kontentiĝis pri la mangaĵo kaj trinkaĵo, al prezidantino, tion mi povas certigi. Sed ni ne nur manĝis kaj trinkis, post la festeno disvolviĝis agrable la distra momento. Tion vi povas bedaŭri kara Prezidantino. Kantoj, poemoj, prozo resonis en la salono, aperturo estis ludita de nia "Esperanto Orkestro" koncertis nur unu sola koncertantino, laŭ-orel-aŭde venontjare ili estos tri(?). Estas komenco por ĉio! Ĉu ne Prezidantino? Poste ni aŭdis poemojn tre bone deklamitajn kun la sento kaj la koro; ĉiuj ĥore, laŭte, agrable, belsone kantis popolkantojn. Gratulojn! Vere okazis agrabla festo! sed mankis Vi Prezidantino!

Partoprenintoj.

Nur 18 personoj partoprenis la bankedon, du pliaj alvenis por la distra parto. El Montpellier du anoj honoris nin per sia ĉeesto. Partoprenis dum la plena festo, ĵurnalistino de la gazeto "la Marseillaise", Fino Marie TUORA, kiu jam verkis plurfoje artikolojn favore al E-o. Bonvenon al beziersa magistratanino inter ni. Ŝi komencis lerni esperanton kun novulinoj, bonvenon do al ĉiuj.

Ne forgesu!

Ne forgesu niajn venontajn kunvenojn je la 2a kaj duono posttagmeze, estu akurate en:

"La Maison de la Vie Associative": 15 rue du Général Marguerite - Béziers

la 09/01/1993 - Ni aŭdos la surbenditan prelegon de Sro Janton farita en Vauvert (franclingve)

la 06/02/1993 - Legado de esperanta teksto kaj prilingvaj komentoj.

la 06/03/1993 - (Temo ne ankoraŭ elektita.)

§ § § § § § §
STAĜO EN AGDE DE LA 19a ĜIS LA 23a DE MAJO 1993
IDILIA LOKO + ALLOGA PREZO = AGRABLA RESTADO
§ § § § § § §

("La Marseillaise")

FÊTE DES ESPÉRANTISTES

Amitié et communication

Distraparto, "réunion distractive conviviale" espérantiste traditionnelle pour rendre hommage à Zamenhof, a eu lieu récemment à la Maison des Associations.



Une partie des participants.

A convivialité est un phénomène qui fait partie de toute cette culture espérantiste laquelle, petit à petit, a habillé ce simple outil de communication universelle imaginé par un homme modeste, et qui permet aux gens originaires de cultures différentes de communiquer, parfois pendant toute leur vie, de se rencontrer sans autre intérêt que celui de l'amitié, d'avoir des relations privilégiées avec d'autres dans le monde entier, bref de communiquer réellement. C'est donc dans une ambiance chaleureuse et pleine de bonne humeur que le Cercle biterrois d'Espéranto a fêté, comme tous les ans à cette époque, l'anniversaire de la naissance de Louis Zamenhof, médecin par son cœur, né en 1859, en Pologne. La Distraparto a commencé par un repas organisé et pris en commun où chacun offrait sa meilleure spécialité culinaire, allant de gramaĉe à la tarte. Il a permis à la journaliste présente d'apprendre quelques mois d'espéranto et de commencer à construire des petits dialogues. Ensuite, vint le tour des spécialités culturelles. Ainsi, après un moment musical, on écouta le discours de Louis Zamenhof prononcé à Boulogne lors du premier Congrès d'Espéranto, en 1904, suivi du mot de Suzanne Authier, présidente du Cercle, mobilisée chez elle par une maladie. Par la suite, on écouta la lecture, par les présents, des créations originales et traductions (Dauzet, Bob Dylan) - de la prose, de la poésie, des chansons... Tous les genres littéraires sont représentés en espéranto, y compris le théâtre. "Pour l'anniversaire de Zamenhof nous préparons souvent une représentation dramatique", a tenu à souligner J. Pierre Péry, acteur espéranto et membre du Cercle biterrois. "Il existe de nombreuses troupes de théâtre espéranto dont les plus connues sont en Bulgarie, en Russie et à Paris. J'ai fait partie de cette dernière. J'ai joué du Ionesco, du Couteau et autres, à Paris, Liège, Anvers, Bruxelles... Parallèlement, l'enseignement de la langue et j'ai été médaillé au Sénat pour cette activité... Actuellement, nous assurons à Béziers deux cours gratuits de langue par semaine: débutants et avancés".

Marie TUORA

ESPERANTO - STAĜO en AGDE

HERAULT - FRANCE

LOKOferidomo BATIPAUME, kamparmeze je 2km
de Agde kaj de la maro.**DATOJ**de la 19a posttagmeze ĝis la 23a de
Majo 1993 ptn.**PREZO**170FF /tage en 2lita cambro (680 FF
por la tuta restado.

880FF en unulita cambro.

*Littukoj entenataj; kunportu nur tualettukojn.***KOTIZO**120FF ĝis la 30a de Aprilo, 180FF poste.
Senpaga por la junuloj malpli ol 25 jaroj

:-:-:-:-:-

SCIU:*Por la personoj, kiuj alvenos vagonare,
automobilo atendas vin ĉe la stacidomo.***ANTAUPAGO:**290FF (170+120) antaŭ la 30 a de Aprilo. 350FF poste,
sendu ĉekon aŭ postanmandaton je la nomo de :
Fédération Départementale Esperanto de l'Hérault**LIEU**Maison de vacances BATIPAUME, en pleine
campagne à 2km d'Agde et de la mer.**DATES**du 19 Mai après-midi au 23 Mai 1993
après-midi.**PRIX**170FF /jour en chambre à 2 lits (680 FF pour
tout le séjour)

880FF en chambre individuelle.

*Draps compris; apporter linge de toilette.***COTISATION**120FF jusqu'au 30 Avril, 180FF ensuite.
Gratuit pour les moins de 25ans.

:-:-:-:-:-

SACHEZ:*pour les personnes qui arriveront par le train,
une voiture les attendra en gare .***ACOMPTE:**290FF(170+120) avant le 30 Avril, 350F ensuite, à
adresser par chèque ou mandat au nom de:
Fédération Départementale Esperanto de l'Hérault**SENDU ĈIUJN KORESPONDADOJN / TOUTES CORRESPONDANCES**

al / à : C.B.E. 9 Rue G. Picot 34500 BEZIERS

TELEFONNUMEROJ

Tel. 67-311-318 / 67-311-346 / 67-380-352

*aldonu afrankitan koverton por pliaj informoj**ajoutez une enveloppe affranchie pour plus amples informations***- ALIĜILO - BULLETIN D'INSCRIPTION -****NOMO k. Persona nomo/ NOM & Prénom** :**ADRESO / ADRESSE** :

.....Tél.

Tago/jour Horo/heure

Mi partoprenos kaj alvenos trajne ĉe la stacidomo de Agde :

Je participerai et j'arriverai en gare d'Agde :

O-O-O

Mi partoprenos kaj alvenos per propra aŭtomobilo rekte al Batipaume.

Je participerai et arriverai en voiture particulière directement à Batipaume.

O-O-O

INDIVIDUA CAMBRO/CHAMBRE INDIVIDUELLE : JES/OUI NE/NON

O-O-O

NIVelo DE KURSO: (Faru krucon ĉe la elektita / Faites une croix au cours choisi.)**NIVEAU DU COURS:** 1-(débutants) -2 -3**EKZAMENO/EXAMEN** : JES/OUI NE/NON - NIVelo/NIVEAU : 1 2 3

(forstreku la ne utilajn/ rayez les inutiles).

O-O-O

ALIAJ DEZIROJ : Proponoj por distraj vesperoj, aŭ promenadoj k.t.p.**AUTRES SOUHAITS:** propositions pour les soirées, promenades etc.

(projection, film, talents personnels etc.)

Agréé par le Ministère de l'Éducation Nationale
par le décret n°34-59

Siège social : 5, Rue du Docteur Roux
34000 MONTPELLIER (FRANCE)

CCP Montpellier n° 1487 48 D

Dankon al la grupo de Montpellier kaj speciale al la aktiva sekretario, Louis Ensueque, pro la multaj informoj. Pardonpeton pro la neceso resumi. Menciinde, ke antaŭ ĉiu kunveno informo estas sendata al "Midi Libre" kaj ĉiufoje ĝi aperas. Ni regule informu la gazetaron !

Septembro: S-ro Ata Mohammad (Pakistano) restadis du tagojn en Sète kaj prezentis sian landon/ Ni partoprenis la forumon de la asocioj.

Vi (eble) rekonos ĉi-supre kelkajn el la deĵorintoj: L. Ensueque, C. Cayzac, A. Diez, J. Hénin.

Oktobro: Pro ne sufiĉa partopreno, la ĝenerala kunveno estis prokrastita ĝis Decembro.

Vizitis nin Kroato, Neven Kovačić. Li prelegis pri la temo: "Halto la milito ! Ni haltigu la militon!" (raporto malsupre).

Te-salono malfermiĝis en nia ĝemelurbo Chengdu. Ni informis ambaŭ urbestrojn pri tiu rendez-vous-ebleco.

Novembro: Lumbildoj vojaĝigis nin.

Decembro: 17 personoj ĉeestis la ĝeneralan kunvenon kaj 8 sendis rajtigilon. S-ino Céliqua demisiis de sia posteno de kasistino; ĉar ne estas nova kandidato, provizore ŝi enkasigos la kotizojn (85F); adreso: 4, Plan du Castellou 34970 Maurin, pĉk ĉi-supre.

La sidejo restas ĉe la prezidantino, la kunvenejo restas la sama. La estraro decidis pri asekuro ĉe Macif (655F jare). Argentinano, Atilio Rosellanas Rojas, vizitis la grupon je la 16a de Decembro. Nur 8 esperantistoj venis.

Januaro: Reĝa kuko la 6an de Januaro

Februaro: L. Ensueque parolos pri Egiptio (lumbildoj) 3/2

...kaj venontan someron okazos DU internaciaj semajnoj, organizotaj de nia grupo:

Aŭgusto: de la 21a ĝis la 28a de Aŭgusto 1993, en Alpoj, je 1100m super la marnivelo en vilaĝeto Habère-Poche, meze de kamparo kaj arbaroj, 25 km sude de Thonon...

Septembro: de la 4a ĝis la 11a de septembro ĉe mediteranea marbordo, en havenurbo Sète, 30km okcidente de Montpellier, en bela parko apud la maro...

Venu al la semajno(j) por lerni aŭ perfektigi vian scipopon pri Esperanto. Ni havos diversnivelajn kursojn, gvidotajn de eminentaj geinstruistoj inter kiuj Pierre Babin, Daniel Moirand, Alain Favre. Kiel ĉiujare vi trovos internacian etoson. Ankaŭ ...

banado, porpiedirantaj promenadoj, ekskursoj, vizitoj, kantado, interesaj vesperkunvenoj kaj bona manĝo ĝojigos vin. Tre modesta restadokosto; ambaŭ restadejoj taŭgas por rulseĝoj. Eblas tendumi proksime. Informas la kultura centro (adreso supre) tel: 33 67 54 15 43.

Certe la argumentaro konvinkis vin partopreni ! Bonan sukceson al ambaŭ aranĝoj.

Car la informo estas sendita al pluraj dekoj da E°-gazetoj/revuoj, ni povas certigi, ke la ĉeestantaro estos vere internacia.

Pri la vizito de Neven Kovačić (Kroatio)

Dank'al afableco de la estro de la ĉiesdomo l'Escoutaire, la montpelliera kultura E°-centro akceptis NK, lunde la 19an de oktobro 1992, matene dum ĉiusemajna konversacia kunveno, kaj je la 18h30 por ĉiuj klubanoj. Dum pli ol unuhora parolado, Neven tre agrable, afable kaj interesigege kaptis nian atenton pri ĉi-tiu vea sed tamen aktuala temo. Li precipe informis nin pri historio de la diversaj popoloj de eksa Jugoslavio, kaj tio vere klarigas la nunajn malfeliĉajn eventojn. Tuj poste, ni kune manĝis en memserva restoracio kaj cetere daŭrigis nian interparoladon pri diversaj aliaj temoj.

Lastminute: La Montpellieranoj ĉiam fruas (NDLR)

Dum la reĝkuka festo (ankaŭ novjara), la klubanoj trinkis plurajn glasetojn de bongustega "Blanquette de Limoux". Ni memorigos ilin kaj la legantojn de SFS, ke ĝuste en Majo nia federacia kongreso okazos en Limoux, kie ni vizitos kelojn, trinkos "Blanquette" kaj eĉ povos aĉeti botelojn de Blanquette kun E°-etikedo... por la venontaj reĝkukaj festoj !

Aldono al la programo: 17/3: Peruo (O. Hamelin) 7/4: Islando (A. Capus)

12/5: pri unu el la sinsekvaj Jugoslavioj (A. Dreschmann)


2/6: eble en kamparo aŭ en ĝardeno...



Rendez-vous à Chengdu !

Depuis septembre, un nouveau salon de thé, baptisé "Esperanto-salono", a été ouvert au centre de la ville de Chengdu (Chine), face au Palais des Arts "Jincheng".

Les espérantistes de Chengdu envisagent d'en faire le point de rencontre pour les visiteurs étrangers. Contacts et informations : S-ro Mu Bing, Chengdu Universitato, CN-610081 Chengdu, Sichuan, Chine / Ĉinio



Pri la vizito kaj prelego de Atilio Rosellanas Rojas (Argentino) en Montpellier:

Pro striko de la francaj fervojistoj, Atilio alvenis en Montpellier nur kelkajn horojn antaŭ la antaŭvidita prelego. Titolo de la prelego: Argentino kaj ties Indianoj. Akompanas la prelegon trideko da lumbildoj. La prelego, kvankam sufiĉe mallonga, kaptas atenton de ĉiuj partoprenantoj, dank'al klara elparolado, malrapida fluo de la parolanto kaj pensigema temo (certe ne atendita). Multaj demandoj sekvas pri sekeco en Argentino, pri alfabeto de la diversaj indianaj lingvoj, pri "malkovro" de Ameriko por Eŭropanoj, pri mem-konscio de indianaj kulturoj kaj lingvoj ĉe la Indianoj mem kaj ĉe la ceteraj geloĝantoj.

La tuto daŭris proksimume 1 horon kaj duonon kaj ni pasigis tre agrablan kaj interesan momenton. Du klubanoj akompanis nian argentinan amikon en restoracion. L.E.

Car malmultaj Montpellieranoj renkontis nian argentinan samideanon kaj li-mem ne vizitis (ve!) aliajn grupojn, jen parto de dupaĝa artikolo pri li aperinta en "Kontakto".

Profesio: vojaĝanta Esperanto-instruisto



□ Kion pensas amerikano en Eŭropo pri la 500-jariĝo de Ameriko?

A: Antaŭ ol veni al Eŭropo mi multe pripensis, kio povus esti mia rolo ĉi tie, en tiu ĉi jaro, kaj tial mi pli funde studis pri niaj indiĝenaj popoloj. Mi rimarkis, ke en Eŭropo kelkaj muzeoj ekspoziciis metiartaĵojn de niaj indianoj... kaj jen ĉio! Mi klopodas aldoni mian parton prelegante por konscii pri la detruo de niaj kulturoj fare de la eŭropaj invadistoj.

□ *Kiaj estis la reagoj?*

A: Ili multe dependis de la loko. En Bratislavo, Ĉeĥoslovakio, mi prelegis antaŭ gelernantoj de la Internacia Gimnazio dum la konferenco de ILEI. Tre surprizis min la reago de germanaj geknaboj, kiuj bone konsciis, ke la alveno de eŭropanoj estis la granda kaŭzo de detruo de indianaj kulturoj. Tian reagon mi ĝenerale ne trovis aliloke. Des pli kontenta mi estis, ĉar temis pri tiel junaj homoj!

□ *Lastatempe oni pli kaj pli raportas pri la kresko de rasismo tra Eŭropo. De via mondoparto oni ne aŭdas pri rasismo. Kio estas via sinteno kaj ĉu vi proprahaŭte sentis diskriminacion en Eŭropo?*

A: En Sudameriko ni ne povas senti rasismon, ĉar ni mem estas rezulto de granda kunfandiĝo de rasoj kaj kulturoj. Estis ĉi tie, ke mi unufoje spertis fortajn reagojn kontraŭ homoj, kiuj apartenas al alia kulturo aŭ gento. Ankaŭ kontraŭ mi kelkaj reagis, pro mia haŭto, pro mia rido, pro kutimoj. Kun granda miro ni tre ofte televidas en Ameriko pri la forta rasismo en Germanio. Tio estas por ni, amerikanoj, fora kaj stranga sento. Aparte mirigis min ĉie tra Eŭropo la malamo al la turkoj. Ĉiam "la eksterlandanoj kulpas": pri pisado surstrate, pri ŝtelado, rompado de vitroj... pri ĉio, kio estas malbona. Neniam aŭstroj faras tion en Aŭstrio nek hispanoj en Hispanio.

□ *Ĉu eŭropanoj do estas ŝovinismaj?*

A: Ho, sendube! Ene de Eŭropo mem, unu rilate la alian! Ofte oni ŝercas pri alia gento. Tion oni ja faras ĉie tra la mondo, sed ĉi tie tiaj ŝercoj estas tre pikaj kaj malagrablaj. Oni primokas la polojn, ĉar ili estas fivendistoj kaj ebruiloj; belgoj estas stultaj; italoj tro parolemaĉas. ktp.

Multfoje oni reagis al alilandano laŭ stereotipoj, kiujn oni jam havas. Svedo devas respondi al la bildo, kiun oni havas pri svedoj; la germanoj devas ĉiam esti akurataj. Kaj tamen mi trovis germanojn tute malakuratajn kaj malfermitajn! Mi partoprenis aranĝon en Darmstadt, kaj tie ni dancis argentinajn kaj bolivianajn dancojn ĝis noktomezo: kaj ni ĉiuj kantis kaj trinkis!

□ *Kio pri viaj estontaj planoj? Ĉu vi jam intencas stabiligi en iu lando?*

A: Mi ankoraŭ restos en Eŭropo. Jarfine mi prelegos en Germanio kaj Francio. Komence de la venonta jaro mi revenos al Argentino, kie mi devas trapasi la lastan ekzamenon por diplomiĝi pri klasika filologio. Poste mi denove instruos en Bolivio kaj Peruo. Krome mi planas iri al Kostariko kaj Haitio. Kaj... poste reveni por la UK en Valencio.

□ *Mi aŭdis, ke vi planas "invadi" Afrikon...*

A: Jes. Post la Universala Kongreso mi deziras iri tien por trejni instruistojn.

"Images de Marques": ĝi estas luksa revueto, senpage distribuita en Montpellier kaj apude (laŭdire 500 000 legantoj). La tria numero (la nuna) pritraktas interesajn temojn, ekzemple: ĉu vi konas Maastricht? Monbileto por Eŭropo... Tiu lasta artikolo, belege ilustrita, komparas la diversajn monunuojn kaj Ekuon kaj ankaŭ mencias pozitivajn, almenaŭ la redaktoro scias, ke E^o estas ankoraŭ parolata. Ni skribis al li.

Ce billet, c'est aussi celui que nous vous offrons pour voyager à travers les 12 devises européennes ! A travers une Europe qui abrite sur une superficie totale de 2 631 000 km², 345 millions de ressortissants qui parlent, outre la dizaine de langues « officielles », une trentaine de langues régionales ou de dialectes locaux. Comment s'y retrouver ? On a bien essayé de leur inventer une langue unique -et certains se battent encore pour la défendre !- « Esperanto », sans grand résultat.

l'ECU se révélera-t-il aussi une belle utopie ou est-il déjà là ?

esperanton. Eĉ se la konkludo estas duon-

Pri la U.K.-oj: Laŭ raporto de Annick Tora

UK de Vieno : nur 2 flagoj sur la kongresejo! Bedaŭrinde, nenio ekstere aŭ en la urbo anoncis la internacian kongreson en la Kongrespalaco... Tamen plurfoje ni parolis kun Vienanoj, scivolemaj pri nia insigno. Ofte ni renkontis Vienanojn, kiuj parolis la francan lingvon./ Infana kongreseto okazissamtempe kun 36 infanoj el 15 landoj. Ili bone kantis kaj ludis skeĉon dum la Internacia Vespere/ La vetero estis ĉiam belega sed iom varma (pli ol 30 gradoj); feliĉe la kongresejo estis freŝa/ Kongrestemo: kiam falas muroj de mil-jaroj : komuna Eŭropa domo. Dum la solena inaŭguro, Sro Wells, Prezidanto de UEA, reasertis, ke E^o estas ĝusta kaj justa solvo por la monda lingvoproblemo.

Sro Fischer, prezidanto de la Aŭstra Parlamento, Alta Protektanto de la kongreso... kaj filo de Esperantistoj... esprimis la deziron, ke E^o ne estu historia memoraĵo sed ankaŭ ideo por la dudekunua jarcento. La nepo de Zamenhof parolis pri "Muroj de Miljaroj".

"Parko Zamenhof" estis inaŭgurita la 25an de Julio en Karlsplatz. Tien oni ankaŭ translokiĝis la Zamenhof-buston. Cento da personoj partoprenis la manifestacion. Junaj Esperantistoj el Germanio ludis dueton de Beethoven.


Sro Vicente Gonzalez Lizando, vicurbestro de Valencia kaj membro de la Hispana Parlamento invitis ĉiujn en esperanto al la U.K. La kongresejo estas bela Muzik-palaco kun sufiĉe da salonoj por ĉio. La kongresejo estos senpaga. La hoteloj estos multe malpli kostaj ol en Vieno. Pro la varmeĝo la salonoj estos malfermataj de la 8a h. ĝis la 12a kaj de la 17a ĝis la 24a aŭ la matene! Nenio okazos en la kongresejo inter la 12a kaj la 17a (siesto!). N.d.l.r.: laŭ aliaj informoj, la urbestro de Valencia subvencios la tutan koston de la uzo de la kongresejo (sesdek mil dolaroj); la konsilantaro aldonos subvencion de dudekmil €. Por la unua fojo aŭtonoma kongreso estas subvenciata en tiu palaco.

Niaj najbaroj estas gratulindaj, ĉu ne?

**
*

ALES

En Oktobro, organizita de la urbestro, okazis la kutima forumo de la asocioj. Pliafoje dank'al la zorgo de Sro Ernest Bolla, nia loka klubo, la Verda Stelo, prezentis budon. La frekvento de la gevizitantoj estis sufiĉe kontentiga. Proksimume tridek homoj, el kiuj gejunuloj, fakte haltis, kaj babiladis kun ni; pluraj konsentis lasi sian adreson. Ĉiumerkrede, de la IOa ĝis la I2a horo, funkcias komenca kurso por gejunuloj en Le Mas Sagnier, libertempa kampara tagadejo, gvidata de Sro Bolla. Centurbe en la urba kulturdomo André Chamson, Sro Bolla deĵoras por la klubo de la IOa ĝis la I2a45. Sur la foto de maldekstre: Sro Cornu, prezidanto, Sro Vigne, Ilei-a mezgrada instruisto kaj la sindonema "ĉionfaranta" kasisto, Sro Ernest Bolla dum la forumo de la asocioj.



NIMES:

Ĉifoje ne venis multaj informoj el Nîmes. La grupo ankaŭ partoprenis la forumon de la asocioj fine de Oktobro. Kontentiga rezulto. Ni deziras rapidan resaniĝon al S-ino Gausson. Dankon al tiuj, kiuj anstataŭis ŝin por la kursoj.

P.O.

PERPIGNAN:

Unuagrada kaj perfektiga kursoj ĉiumarde en la sidejo de la kultura centro, 72, Avenue du Général de Gaulle (vitra pordo teretaĝe). Montrofenestro kun konstanta ekspozicio. Propagando per gazetoj kaj radio ĉiusemajne por la kursoj kaj okaze pri gravaj eventoj. Alice Payret partoprenis la Zamenhofan feston en Tuluzo. Ŝi raportas: "La sesan de decembro la esperanta Tuluzo grupo festis la Zamenhofan tagon. Ĉeestis ĉirkaŭ tridek personoj, plejparte Tuluzanoj sed ankaŭ kelkaj el proksimaj regionoj. Post la manĝo, Sro Albault parolis pri interesa temo: kiel estis konstruita la esperanta alfabeto, komparo kun aliaj. Sekvis la arta parto: kantoj, teatraĵoj, muziko... Ĉiuj, tre ĝojaj, adiaŭis je la dekokaj".

LA CANOURGUE/RODEZ: LOZERE/AVEYRON

Neven Kovaĉić (Kroatio) vizitis nin post Montpellier la 20an kaj 21an de Oktobro. En Rodez li alparolis 15/20 personojn. Tre interesa prelego. En La Canourgue li renkontis diversajn klasojn de la kolegio kaj interesis la gelernantojn, kiuj faris multajn demandojn. Domaĝe, ke ne venis la antaŭvidita Argentinano, por findecidi ilin eklerni esperanton! Ĉar venis ĵurnalistoj nek al la kunveno de Rodez, nek al la kolegio de La Canourgue, ni kontaktis telefone la gazeton "Midi Libre" en Mende kaj veturis tien. La intervjuado daŭris unu horon kaj la ĵurnalisto agnoskis la lingvan problemon en Eŭropo. Aperis poste longa artikolo kun granda foto kaj plurfoja mencio de E° (pro spacomanko en tiu ĉi bulteno...). Sekve "Lozère Nouvelle" ankaŭ petis raporton. Ni ankaŭ partoprenis la forumon de la asocioj en Millau (deĵoris J. Hénin, B. Legeay, A. Rocher). Ĉar ni povis proponi nur perkorespondan kurson, eble ni perdis kelkajn interesatojn. Ni anoncas al vi la naskiĝon en Rodez de bulteneto "la verda ŝafo". Ĝi certe pligrandiĝos!

KAMPANJO por la LICEOJ

Dum aŭtuno 92 ni disdonis al ĉiuj liceoj de nia regiono (kaj al kelkaj periferie en Aveyron kaj Ariège) la libreton de Pierre Janton (Puf/Que sais-je? 1511). La federacio, kiu investis ampleksan sumon, ŝatus ricevi kelkajn informojn pri la rezultoj. Ĉu venis eĥoj? Ĉu liceestroj kontaktis vin por prelegeto, ktp? Bonvolu konservi por/aŭ resendi al nia sekretario la liston de la liceoj de via departemento. Kelkfoje la sama lernejo aperas sub du rubrikoj kaj verŝajne restos kelkaj ekzempleroj, kiujn ni donos al bibliotekoj. Alportu la restantajn ekzemplerojn al nia kongreso en Limoux. Post la kampanjo por licea, la kampanjo por kolegia. Antaŭ ol elspezi nian monon, ni deziras ekscii, ĉu la unua kampanjo utilis kaj efikis. Dankon pro via helpo.

